

Ricarda Huch,

Sur monta alto

tradukita de Manfred Retzlaff

Kien homa bru' ne venas,
mi sub la ĉiel-senfin'
sentas, ke konsole tenas
senmakula mondo min.

Iĝas for sopiro, ĉia
dezirado lasa min,
kaj la font' de ploro mia
tute simple fermas sin.²

*Traduko de la Germana poemo "Auf Bergeshöhe" de RICARDA HUCH (*1864-07.18 – †1947-11-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-06-05.*

MR-097-1 / Arg-757-1521 (2013-01-04 18:52:59)

Pri la poetino vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Ricarda_Huch.

²aŭ:

Iĝas for sopiro, ĉiaj
kordeziroj lasas min,
kaj la font' de larmoj miaj
tute simple fermas sin.